

Verda Voĉo de Doksy

REDAKTORO ANT. SLANINA

INFORMA INSTRUA KAJ AMUZA BULTENO DE SOMERA

ESPERRANTO - KOLEGIO

Obĉzník pro ŝactvo a pŕátele "Letní Koleje Esperanta" v Doksech.

Ĉ. IV.9.

Doksy, 27.ĉervence 1949.

ESTI HOMO

Siatempe tre bone konata ĉeĥa poeto J.S.Machar skribis, ke li foje en gimnazio ricevis malbonan noton en la religio katolika. La profesoro-pastro intence donis al li malfavoran ateston dirante, ke la poeto je tre bone scias la religion, sed ne kredas je Dio.

Analoge oni povus juĝi pri Esperanto. Multaj niaj kursanoj venis al Doksy, nian verdan paradizon, jam havante la kredon kaj fidon esperantan en siaj koroj, la aliaj tiun kredon en Doksy serĉis kaj trovis. Kaj ni ĉiuj venos ĉi tien por lerni kaj perfektigi en la lingvo. Se oni kants en nia fama kanto: "ke nia kara familio konsistas el sanktuloj de l' ĉiel' . . .", efektive oni volas diri, ke ni deziras esti nur homoj, simplaj homoj de bona volo. "Esti homo, tio sonas fiere" skribis nia nacia poeto S.K.Neumann. Por tia nacia, ŝtata kaj socialisma evoluo ni povas doni la plej efikan apogon konsilante al ĉiuj zamenhofaj disĉiploj: Disvastigu la lingvon kaj elte tenu la internan ideon.

Dr.Vanĉk

- o -

Karolo Piĉ

P e n d e v u o

Ho, mia Dio, jam la dekdua !
Jen mia buŝo ! Kisu min !
Rapide ! Estas temp' malfrua !
Kaj kion diros la patrin ?

Ŝi certe en la ĉambro legas,
nombras sekundon post sekund',
atendas nin kaj koleregas . . .
Ekstere bojas mia hund' . . .

Kaj dume tie ĉi mi staras . . .
Ho donu buŝon al la buŝ' !
Rozo aromas . . . Ĉu vi flaras ?
Kaj bela estas ĉiu tuŝ' !

Nun stelo falis. Ĉu vi vidas ?
Sed, kara, sendu, sendu min
jam hejmen ! Mi min ne plu bridas . . .
Kaj . . . Kion dirus la patrin' ?

/La poemo estis premiita en la II. "Floraj Ludoj de Somera Kolegio de Esperanto" en Doksy
16. - 30. VII. 1949/.

VERDKORULO SKRIBAS...

Do, miaj gekaruloj, ni jam preskaŭ senrimarke transiris la limon de dua semajno de nia restado en Doksy. Kaj eĉ la suno kvazaŭ eble ĉesus opono, kvazaŭ ĝi kompatas la bedaŭrindajn samideanojn kaj volus almenaŭ la lastan semajnon al ili iomete plidolĉigi.

Kaj kun supreniranta suno supreniras ankaŭ la humoro en la lernejo. Post du horoj ankoraŭ post unu horo jam post duono - jen – sonorilo.

Kaj la pordo de lernejo aperiĝas dekojn da nomoj, kriantaj kvazaŭ malgrandaj infanoj, homoj feliĉaj kaj kontentaj, rapidantaj plenigi siajn stomakojn por esti kiel plej frue ĉe la lago. Sed ili ne estis jam la timigitaj, nekuraĝaj komencantoj, kiuj antaŭ unu semajno ankoraŭ ne sentis sin en propra haŭto, hontinte, ke ili devas nur aŭskulti la esperantan interparolon de la aliaj. Hodiaŭ ili estas homoj, Esperanton ne nur komprenantaj, sed ankaŭ sciantaj ĝiu paroli.

Ili gajnis memkonscion, kuraĝiĝis, forĵetis ĝenon – kaj jen: ili scias Esperanton: Ĉar ĉiuj nemitaj faroj signifas supozon por bona regado de la lingvoj entute, kaj precipe de lingvo nia. Ĉar ĝin ni lernas per la konversacio, la ĝenon nekonanta.

La malnova lernejo forlasas siajn infanoj afable kaj kun rideto. Ĝi enamiĝis la verdan popolon, jam kvaran fojon kunvenanta travivi tie dek kvar belajn tagojn.

Ĝi konas la reciprokan sinceron, la emon, kun kiu la grandaj lernantoj aliras sian laboron – ĝi ekkonis de proksime la esperantistan familion.

Kaj pro tio ĝi precipe gojas. Ĉar Esperantistoj diferenciĝas je ekstere de aliaj homoj nur per la verda, kvinpinta stelo, sed kiam ili estas inter si, ili kreas la soĉan, enviindan medion.

Med ion, kiun devus parordone observi ĉiuj, kiuj decidas pri paco aŭ milito. Kaj kredu, ke tuj estas decidite. Ĉar tute ne estas eble elekti militon tie, kie oni vivas en tia harmonio, kiel ĵus la Esperantistoj ! -

La suno brilas ... kaj solanta lernejo dormetas en tagmeze varmege ...

-NoMo-

S e n t e n c o j

Světovými lidmi se nestaneme
jen obvyklým cestováním,
mezinárodním stykem, nýbrž
duchovním ponořením do života
lidí, národa, lidstva.

T.G.Masaryk

- - -

Silen je ten, kdo více dává
než přijímá a jde vytrvale za
dobrým cílem.

G.Tverster

- - -

Kdo je přítel? První člověk,
který přichází, když celý svět
odešel.

O.S.Marden

- - -

Láska a přátelství vyžaduje
otevřenosti, důvěřivosti a
vzájemnosti.

Emerson

- - -

Malé vědění dává lidem pýchu,
velké skromnost.

Kdo málo ví, málo miluje.

Dokonalé vědění je dokonalá láska.

A.S.Merežkovskij – z knihy
"Leonardo da Vinci".

- - -



Zdeněk Raška –
eterna parolanta /etera/ el Ostrava

TAGAJ INFORMOJ

Hodiaŭ estas la 27-an julio 1949. Laŭ
katolikoj st.Pantaleono, laŭ ĉs. Zlatko.
Vetero - ege bela.

Programo:

Vzhledem ke krásnému počasí koupání v jezeře.
- Pro účastníky kursu E opět cvičná hodina od
14.00 hod. ve škole. Následkem toho lekce
řečnického kursu odložena na čtvrtek na 14.00
hod. v Přírod. divadle. Připravte si 5ti
minutovou náborovou řeč v ĉs. Jazyku: "Jak
získati nové esperantisty". Diskuse o
pronesených řečech bude v esperantu.
Dnes večer bude Benátská noc na jezeře.
Začátek v 21.00 hod.

3a Slovaka Esperanto-Kongreso

Provizora programo:

Sabate 7.00 – Akceptado de la kongresontoj.

20.00 – Interkonatiĝa vespero.

Dim.: 8.00 – Rom-katolika diservo 8.45 –

Protestanta diservo 10.00 – Solena malfermo.

Ĝenerala kunveno de SES 12.30-14.00 –

Paŭzo por tagmanĝo 14.00-18.00 –

Ŝipekskurso al Devino 18.00-20.00 –

Vespermanĝo 20.00 – Artvespero / teatraĵo/

Lundo: 8.00 – Laborkunvenoj, prelegoj, fakaj

kunvenoj 8.00 – Ekzameno pri lingvoscio

11.00 – Solena fermo

Posttagmeze: ekskursoj en la ĉirkaŭaĵon.

Rimarko: Programeroj / prefere ŝercoj kaj
spiritaj aŭ artistaj/ de kongresanoj por la
interkonatiĝa vespero estas bonvenaj. Sciigon
pri la prezentota programero, eventuale ĝian
tekston aŭ priskribon sendu frutemo al la LKK.

Adreso: 3a Slovaka Esperanto-Kongreso,
Bratislava I, Zámečnická 8/

Grava atentigo por la kongresanoj!

Ĉe alveno al Bratislava nepre serĉo la
akceptejon en la ĉefa stacidomo signitan per
verda standardo! Tie ricevos informojn pri
leĝejo, programo ktp.

Ni varme rekomendas al niaj lernantoj
partopreni la kongreson!

Latina a Esperanto

V poslední době se obrátil papež s poselstvím k
motocyklistům. V tomto dokumentu nazývá
motocykl takto: Birota igniferalatice encitata,
což znamená: Dvojkolka ohnivou tekutinou
poháněná. Tím je znovu podán důkaz, že latina
není cšopna se státi pomocným jazykem
dorozumívacím. Jakjednoduchý máme naproti
tomu výraz v Esperantu: motocyklo.

/Esperantista, 15.VII.49/

"Somera kolegio de Esperanto" en Doksy

aranĝas la 28an de julio 1949 en la ĉefa katolika preĝejo en Doksy
je la 20,30 horo

KONCERTON

de voĉa, orgena kaj korda muziko.

PROGRAMO:

Bortnanskij: KOL SLAVEN korda kvarteto
Bach: PRELUDIUM koncerta gitara solo
je rememoro de Georgo Dimitrov, la grava Slavo
kaj amiko de Esperanto.

- | | | |
|----------------------------|-----------------------|--|
| 1. Haendl:
Giordano: | LARGO
CARO MIO BEN | aldo, akompanata per organo
kaj violono |
| 2. Haydn:
Mozart: | ADANGIO
AVE VERUM | korda kvarteto |
| 3. Dvořák: | BIBLIAJ KANTOJ | baritono, akompanata per
orgeno |
| 4. Tarriga: | LA GRIMO | gitara solo |
| 5. Brahms:
Fibich: | LULKANTO
POEM | aldo, akompanata per organo
kaj violono |
| 6. Schubert:
Beethoven: | ADAGIO
LARGO | korda kvarteto |
| 7. Gounod: | AVE MARIA | aldo, akompanata per organo
kaj violono |
| 8. | ORGENA FUGO | |
-

Kantas kaj ludas anoj de la Esperanta Asocio Ĉeĥoslovaka:

gesinjoroj: VĚRA BORSKÁ, operkantistino, Brno – aldo; Profesoro ŠTĚPÁN URBAN, koncerta gitaro, Praha; Ing. STANISLAV HOTEK, baritono, Praha; MIROSLAV TIRALA, I.violono, Ostrava; ANT. SATTEK, II.violono, Příbor; LADISLAV KAVKA, alto kaj organo, Bakov; Dr. FR. VANĚK, violoncello, Karlovy Vary;